# *Vatikano asertas ke la Papo subtenas la viktimojn.*



Romo, 17 a?g (RHK) Vatikano asertis ke la papo Francisco subtenas la viktimojn de pli ol 300 pastroj akuzitaj pro perforto kaj seksa perforto kontra? pli ol mil infanoj en Usono, informis la brita agentejo Reuters.

“La viktimoj devas scii ke la papo estas je sia flanko. La suferintoj estas lia prioritato kaj la Eklezio volas ilin a?skulti por elradikigi tiun ?i tragikan hororon kiu detruas la vivon de senkulpuloj”, asertis la religia institucio pere de komuniko, informas la televida ?eno Telesur.

La? raporto de la Vatikan-heroldo, Greg Burke, “tiuj ?i agoj estis perfido al la konfido kiuj ?telis la dignon kaj fidon de la supervivantoj”.

Tiun ?i semajnon, la ?enerala prokoruro de Pensilvanio, diskonigis raporton surbase de duonmiliono da dokumentoj internaj el diversaj pre?ejoj, kiuj “enhavas nekredeblajn raportojn” kontra? la pastroj akuzitaj.

Burke aldonis ke “estas du vortoj kiuj povas esprimi la senton fronte al tiuj ?i hororaj krimoj: honto kaj doloro”, kaj samtempe li ratifis ke la Katolika Eklezio devas ellerni fortajn lecionojn el sia pasinteco” kaj ke la Vatikano promesis responsigi la perfortantojn.

Tamen, la ?enerala prokuroro de Usono, Josh Shapiro, kiu diskonigis la raporton, konfirmis ke ekzistis “konstanta ka?ado flanke de altrangaj funkciuloj de la eklezio en Pensilvanio kaj en Vatikano” pri la perfortoj registritaj en la raporto.

https://www.radiohc.cu/eo/noticias/internacionales/169234-vatikano-asertas-ke-la-papo-subtenas-la-viktimojn

**Radio Habana Cuba**